

FERVOJA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de INTERNACIA ASOCIO DE LA ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ

| | | |
|---|---|--|
| <p>Jara abono : ₯ 1. Unu N° : ₯ 0,2 Anoncoj : 1 paĝo : ₯ 5 ; 1/2 paĝo : ₯ 3 ; 1/4 paĝo : ₯ 2.</p> | <p>REDAKCIO S-roj Berlande kaj G. Chilot Administrantaj Redaktoroj Sekretario : S-ro Alfred Petzold Königstrasse, 4 III, Leipzig (Germanujo) Prezidanto : S-ro P. Tarnow Perlebergerstr. 9 I, Berlin-Potsdam.</p> | <p>Ĉiujn manuskriptojn, abonmendojn, anoncojn, k.t.p., adresu al S-ro BERLANDE aŭ al S-ro GEORGE CHILOT, ambaŭ en <i>Ville-neuve-St-Georges (Francujo)</i>. La redakcio rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn. — Artikolojn ne akceptitajn oni ne povas resendi.</p> |
|---|---|--|

NOVAJ ABONANTOJ

G. Bulatnikov, *St-Itat*, Sibirskoj ŝel. dor. (Ruslando).

Joffrin, kasisto de la Esperantista Grupo ĉe Charenton, rue Labouret, Charenton (Seine), Franclando.

P. Haigh, fervojisto, Telegraph Office, Midland station, 73, Folkestone Street, Bradford Yks (Anglujo).

Givord, fervojisto, 3, rue Richard-Lenoir, Parizo.

Bernardon, sekretario de la Esperantista Grupo, 52, rue de Paris, Villeneuve-St-Georges.

Josiĉ, Stacio Koluski ĉe Koluski (Ruslando).

Mi posedas proksimume ankoraŭ 34 spesmilojn post pago kaj sendo de l'nuna *naŭa* numero, do mi bonsane vivas.

AL LA LEGANTOJ

Malrapide, malrapide sed ĉiam senĉese nia abonintaro multiĝas, dank'al tio nia Gazeto aperas regule ĉiumonate, sed mankos baldaŭ la enhavaĵo, tio estas la kopio, kaj « F. E. » tiam estos kiel veziko, ĝi havas nur la eksterajon.

Ni do petas niajn sammetiulojn sendi al ni artikolojn pri fervojaj aferoj aŭ pri societoj demandoj — Por plenumi la dezirojn de kelkaj abonintoj estas decidita, ke ĉiu aboninto rajtas enpresigi anonceton pri ia ajn demando.

DEMANDOJ

1-e Ĉu inter ni estas sufiĉe da plenpovaj oficistoj por aldoni esperantan tradukon al ĉiu letero sendita al fremda Kompanio? Se jes, ke ili provu ĝin fari.

2-e Kiel prosperas Esperanto ĉe via fervojo?

3-e Kiu volas partopreni la tradukon de la Berna Konvencio: « Uebereinkommen betreffend die Güterübergabe und -übernahme sowie die Verteilung von Entschädigungen im internationalen Eisenbahnfrachtverkehr ».

Pri tiuj demandoj bonvolu respondi al S-ro George Chilot, Villeneuve-St-Georges (Franclando).

El *La Ŝvaba Esperantisto*, Marto 1913.

« Ein warmer Fürsprecher des Esperanto trat in Herrn k. Obergeometer Reuss auf, der sich um unsere Sache in Regensburg in den letzten Monaten ausserordentlich verdient gemacht hat ».

S-ro Reuss skribis speciale por « Fervoja Esperantisto » jenan artikoleon. Varmege mi dankas al li.

La nova fervojara muzeo en Niremburgo, kiu posedas ampleksan kolekton de fervojaĵoj kaj poŝtaĵoj, estas ĝis nun lokiginta en konstruaĵo, kiu apartenas al la urbo Niremburgo. La spaco de la konstruaĵo jam de longe ne sufiĉas plu tute por ĝia celo. Pro tio la bavara popolkonsilio (Landtag) laŭ la propono de la administraro fervojara donis la permeson al la konstruo de nova muzea konstruaĵo. La konstru-fundon por ĉi tiu konstruaĵo la komunumo Niremburgo transdonis senpage kaj senŝarĝe al la administraro fervojara. Ĝi kuŝas in preferata distrikto de la urbo, norde de la konstruaĵo por la fervoja direkcio inter la Weidenkeller-, Sand- kaj Lessing-stratoj. La areo havas 5100 kadratojn. La kostoj de la konstruaĵo estis taks-

ataj je 735.000 Sm. (1.470.000 markoj), de kiuj la urbo Niremburgo pagos 325.000 Sm. (650.000 markoj); la resto estos antaŭpagata de la urbo, kaj la administraro fervojara amortizos ĝin per dekjaraj partopagoj el estontaj enspezoj.

Por la konduto de la konstruaĵo estis starigata nova inspektadoro en Niremburgo, kies estro estas direkcia-konsilanto Joh. Weiss. Ĉi tiu ankaŭ verkis la planojn de la nova muzeo fervojara, kiu siatempe estis premiataj per la unua premio kaŭze de la konkurado por la starigo de bazoj per nova bavara fervojara muzeo.

REUSS,
Supera termezuristo.

La transportado de malgrandaj komercaĵoj en Granda Britujo

(Daŭrigo.)

Por transporti la komercaĵojn, la fervojaj kompanioj uzas vagonojn diversformajn, plejparte tiuj ĉi estas malfermitaj, t. e. sentegmentaj, kaj por protekti la enhavojn kontraŭ la pluvo kaj neĝo oni kovras la vagonojn per drapkovriloj. La ĵus pasintajn jarojn la kompanioj konstruis multajn komercvagonojn kovritajn, kaj ĉe kelkaj stacioj tiuj preskaŭ elpuŝis la malkovritajn por la transporto de ĝenerala komercaĵo. La enhancebleco de la diversaj tipoj diferencas de 8120 ĝis 25375 kilogramoj kaj, sen ŝarĝaĵo, ili havas la pezon po 5075 ĝis 15225 kilogramoj. Tiuj nur estas la vagonoj uzataj por ordinara komercaĵo.

Por minimumigi la difekton de sendaĵeroj sekve de malforta ŝarĝo, inspektoroj neatendite vizitas la ŝarĝejoj kaj ekzamenas la manieron laŭ kiu la ŝarĝistoj enmetas la komercaĵojn en la vagonojn. La inspektoroj ankaŭ inspektas la ŝarĝaĵojn ĉe la stacioj de alveno antaŭ ol ĝi estas alvagonigita. La administracioj ankaŭ eldonis kelkajn cirkulerojn por klarigi al la ŝarĝistoj k. t. p. kiamaniere paki la sendaĵojn difektemajn. Aliajn rimedojn kontraŭ la transporta difekto oni trovas en specialformaj vagonoj kaj puŝveturiloj por malfortaj fabrikaĵoj,

pereemaj kreskaĵoj, k. t. p. : ekzemple vitraĵo, fromaĝo nepakita, ovoj, fiŝaĵo, frukto, panfermentilo, viando, k. c.

La komercistoj en Britujo persiste forsendas difekteblajn fabrikaĵojn fervoje sen kia ajn pakprotektilo, aŭ nesufiĉe pakitajn, kaj, spite de la rimedoj supre cititaj, estas tre malfacile ilin ŝargi kaj malŝargi sen risko de difekto okazanta. Por sin protekti kontraŭ plendontoj, tiuokaze la kompanioj fervojaj nur konsentas transporti tiajn fabrikaĵojn je la risko de la posedanto, kaj ne respondas pri transporto sen difekto.

Multe da malhelpo faras sendantoj kiuj rifuzas skribi sur etiketoj la adresojn al kiuj ili sendas pakajon. Tre ofte nur signo aŭ cifero estas montrita, kaj se okazus ke la pakajo apartigus de la fakturo preskaŭ certe la pakajo perdiĝos. Por eviti perdon de tiuj sendaĵoj, la fervojaj ekzamenistoj alfiksis etiketojn montrante la nomon de la stacio de forsendo kaj alveno.

Per mallonga artikolo oni ne povas priskribi detale la metodon de transportado, sed la leganto ekscios ke per la organizo supre montrita la entreprenoj fervojaj faras al la komercistoj bonan servon, ĉar, sekve de rapida ekspedo kaj livero de la sendaĵoj, ne estas necese, ke la komercistoj konstruu aŭ luu grandajn magazenojn por pogrande konservi la fabrikaĵojn, kaj tiu ĉi ebligas al la komercistoj kaj butikistoj aĉeti kaj vendi laŭ pli favoraj kondiĉoj.

W. F. LAWRENCE.

Adressaĝo : S-ro W. Lawrence transloĝis. Nun li estas trovebla 6, Dodgrow Terrace, Acomb, apud York.

GRAND HOTEL DU GLOBE

71, rue Monge, Paris

Proksime Jardin-des-Plantes, Sorbonne, Jardin du Luxembourg kaj Presa Esp. Societo.

A. LECLERC, posedanto.

Hotelo rekomendinda al Esperantistoj.

MODERNA KOMFORTO. — BONA SERVADO. — MODERAJ PREZOJ.

— Esperanto parolata. —

Centra Presejo Esperantista, V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

Le gérant : A. BERLANDE.